

# HEJS

## BULTENO DE LA HISPANA ESPERANTO - JUNULARA SEKCIO

Nro. 14



REDAKTORO: Sro. José M.<sup>o</sup> Cuñat

Septembro-Oktobro 1960

Sto. Valseca, 32, 1.<sup>o</sup>, 2.<sup>o</sup> Barcelono (*Hispanujo*)



### JEN LA DELEGITARO DE HEJS

- 1.<sup>o</sup> Sro. Esteban Olivé (nova delegito en Sabadell)
- 2.<sup>o</sup> Sra. Adelaida Marcet. - 3.<sup>o</sup> Sro. A. Tomasa
- 4.<sup>o</sup> Sro. Ricardo Senís. - 5.<sup>o</sup> Sro. Francisco Parareda
- 6.<sup>o</sup> Sro. J. M. Gutiérrez.

MADRID ESPERANTO  
ALBERTO A. GARCIA  
MADRID-15 ESPERANTO

## NIA DELEGITARO RAPORTAS

Ni prezentas en ĉi numero, raporton de ĉiu el niaj delegitoj pri la laboro farita en sia "teritorio". Ĉiu delegito informas; kelkaj amplekse, aliaj malamplekse, sed por ni la informaro estas sufiĉe interesa kaj oni alvenas al la jena konkludo:

La Hispana Esperanto Junulara Movado ne estas ankoraŭ sufiĉe fortika. Kiun rimedon ni devas konsideri por solvi tiel ĉefan problemon? Kion ni bezonas por ke nia Movado estu sufiĉe fortika? La respondo estas ĉiam la sama en tiaj kazoj; Kreskigo de la membraro. Si ni atingus 50 aŭ 75 pliajn membrojn HEJS ne plu devos peni pro nesufiĉo da mono. Dum la unuaj ses monatoj, la bulteno aperis regule, sed lastatempe ni estis devigataj eldoni ĝin dumonate. Pri la enhavo, ĝi estis ĝenerale sufiĉe bona ĉar ni ja atingis gravajn kunlaborojn, ekzemple de Profesoro S-ro Delfí Dalmau, de S-ro Jose de la Cruz, Prof. Aragay, ktp; la Redaktoro alportis kromsian laboron, ĉiam fervora, la intervjuojn, humoraĵojn, kaj cetere.

Bedaŭrinde nun ni antaŭvidas iom malfortan staton pro tio ni petegas la ankoraŭ nepagintajn membrojn ke ili bonvolu tuj sendi la monon, tiamaniere sekurigante la aperon de la bulteno ĝis la jarfino.

En niaj rilatoj kun eksterlandaj junularsocietoj, pligrandigis la nombro da ricevataj interŝanĝbultenoj.

Oni progresos se la estraro ricevos ĉies helpon kaj kunlaboron. Ni kredas ke kun iom da ĉiesflanka interesemo ni povos eĉ plikreskigi nian ĝisnunan marsadon.

Bedaŭri ni devas ankaŭ, ke pro diversaj kaŭzoj nia estraro ne povis esti oficiale reprezentata en la Pontevedra Kongreso. Same okazis rilate la TEJO-Kongreso en Rotterdam. La cirkonstancoj trudigis.

Je la fino de ĉi tiu skribajo, nur restas diri: Dankon al kiuj iamaniere helpis nin, dankon al nia delegitaro; al ĉiuj ni invitas daŭrigi kaj plifortikigi tian kunlaboron kaj helpon. La ĉies celon do devas esti; pli bone ESTAS; alporti pli novajn membrojn kaj labori fervore por superi tiamaniere ĉiajn barojn. Koncerne niaj junaj eksterlandaj samideanoj ni deziras ankoraŭ pli profunda interrilataj fratecaj.

Al ĉiuj elkore salutas la HEJS-ESTRARO.

Barcelona, la 30-an de septembro. 1960.



JAR-INFORMO DE LA HEJS-DELEGITOJ  
=====

Sajne malmulton mi povas informi vin tiurilate, ĉar aktivajoj komunaj al HEJS-anaro speciale ne okazis, tamen la plejparto el la membraro partoprenis en ĉiuj aktoj de nia Sekcio okazintaj, kiuj daŭre estas raportataj en nia bulteno. Vi konsideru ke nia HEJS-agado ankoraŭ ne funkcias bone organizita, kaj cetere ĉe ni, mi ne povas ĝin bone prizorgi adekvate, mi esperas ke la novaj delegitoj (samideanoj Alberich kaj Olive) je mia instigo klopodos aranĝi baldaŭ novan kaj pli aktivan pla-non. Tamen mi kredas ke la organizado de aktivajoj komunaj al ĉiuj HEJS-grupoj devus esti elpensita de la HEJS-estraro kaj laŭ via plano instrukci- ĉiujn delegitojn pri la aktivajoj farendaj, kiuj okazos entute aŭ parte laŭ la cirkonstancoj kaj eblecoj de ĉiu grupo. Bonvolu konsideri mian sugeston, mi petas. Amike kaj samideane vin salutas.

Ll. Puig -Delegito en Sabadell

---

Munĵaro ni havis en Madrid pli bonan ŝancon ol pasintjare pri aranĝo de junulara grupo. Ni atingis etan grupon (ĝi ne estas pli nombra ol 10-membra), sed preskaŭ ĉiuj ĉeestas niajn kunvenojn; bedaŭrinde ili ne estas ankoraŭ sufiĉe lingve kapablaj esperantistoj. Lastatempe Madrida Esperanto Klubo ekhavis novan sidejon kaj ni esperas ke tiu ĵus akirita loko estos por ni grava antaŭenpuŝilo ĉar tie ni havos pli da libereco por agi.

J.M. Gutiérrez - Delegito en Madrid.

---

En nia vilaĝo la agado de HEJS estas tiu de Esperanto-Grupo Moya, ĉar la grupo konsistas el 40 gejunuloj, el kiuj 16 estas HEJS-anoj.

Dum la pasinta kurso ni ege laboris por disvastigi nian idealon. La loka monatgazeto, regule aperigis niajn kronikojn, kaj ĉe nia grupo regule funkcias la Kursoj per Korespondado de HEP kiuj nuntempe havas 300 gelernantojn. Dum la jaro ni ricevis la viziton de diversaj samlandanaj samideanoj niaj kaj eĉ kelkaj eksterlandanoj vizitis nin. Du el ili prelegis ĉe ni: Sro Taylor el Aŭstralio kaj s-ro Ch. Elliot el Britujo... Funkciis du kursoj tre sukcese en nia vilaĝo: la unua en nia sidejo por knaboj kun partopreno de 15, kaj la dua en la klubo de

VIRINA INSTITUTO, kun partopreno de 8 knabinoj.

La Zamenhofa festo je la mezo de decembro estis tre sole-  
na: Ekspozicio pri Belgujo en nia sidejo; prelego de sro  
Molera pri Dro Zamenhof kaj aŭskultado de sonbendoj rice-  
vitaj de eksterlandaj Esp. Grupoj.

Antaŭ kelkaj tagoj, mi okazigis Kursfinan Feston  
kun partopreno de ĉiuj niaj gemembroj kaj aliaj simpati-  
antoj: La gefratoj Molera deklamis Esperanto-poeziojn; ni  
havis konkursojn, ni prezentis internacian folkloran mu-  
zikon kaj kantojn kaj fine ni trinkis la ĉampanon VERDA  
STELO. Fine nur restas diri ke kvar samideanoj partopre-  
nis la Nacian Konfreson de Esperanto en Pontevedra.

F. Parareda. - Delegito en MOYA.

---

Kun granda plezuro mi faras mallongan informon pri la Es-  
peranto Movado en mia urbo, por la HEJS-bulteno.

Aktuale funkcias en nia klubo nur unu E-kurso. Je  
la komenco de la kuranta jaro, en januaro, okazis en nia  
klubo Esperanta-Festivalo kaj partoprenis ĉiuj aktivaj  
esperantistoj, ankaŭ kompreneble la ĉi-tieaj HEJS-anoj.

Dum la pasinta printempo, vizitis nian urbon la  
konataj geedzoj el Australio Gsroj Taylor, kiuj projekciis  
belegajn kolorbildojn kaj raportis al ni pri ilia lando.

Ankaŭ vizitis nian urbon, itala aŭtoĉaro, gvidata  
de la fervora esperantisto Sro Lovatti kiu organizis la  
ekskurson al Hispanio. Honore al li okazis festo, en kiu  
partoprenis la "Esbart Manresá de Dansaires" ludante la  
popolaj katalunaj dancoj. Tiel povas esti kompilita la  
informo pri niaj ĉefaj aktivajoj en la nuna jaro.

A. Tomasa - Delegito en MANRESA.

---

Bedaŭrinde mi devas diri al vi ke nia E-grupo estas kva-  
zaŭ mortinta, ĉar en ĝi mankas la nervo, tio estas la ju-  
nularo. Krome la ĉi-tieaj malmutaj gejunuloj kunvenas  
tre malofte, mi ne scias kial. Nur la estraro kunsidas  
dufoje ĉiumonate por pritrakti la koncernaj aferoj.

La tuta anaro kunvenas nur dufoje ĉiujareen tre  
gajaj festenoj kaj en la tradicia "Castañada", kaj en la  
respektiva kursfino. Ambaŭ konsistas el mangŝto kaj

gaja dancado. Ĉiusabate kunsidas la plej fervoraj geanoj, sed bedaŭrinde ĉiufoje malpli ĉeestataj.

Antaŭ kelkaj semajnoj ni kunvenis por aŭskultado de kelkaj esperanto-kantoj. La 21-an de pasinta julio okazis prezentado, fare de nia loka ano, de lia edzino, antikva korespondantino. Temas pri samideno E. Benaiges. Tiu edziĝis antaŭ nemulte al f-ino Valerie Barton el Birmingham, Anglio. Pli gaja ĉi tiu lasta novaĵo, ĉu ne ?

Adelaida Marcet. Delegitino en TARRASA.

---

La plej grava afero kiun ni faris estis la reorganizado de nia antikva Esperanto-Grupo. Pro tia reorganizado oni aperigis informa bulteneto por la anoj de nia grupo.

Ankaŭ ni ekskursis tri fojojn kun la anoj de la grupo kaj vizitiss la Belartan Valencian Muzeon. La pasintan 25-an de junio, ni organizis honoran meĝofeston, okaze de kursfino, honore al nia tre kara gvidanto Sro Rafael Vizcaino, kaj la 1-an de julio estis inaŭgurata Somerkurso ankaŭ gvidata de sro Vizcaino.

Kompreneble la gejunuloj ĉi tie nenion povos fari ĝis ni havos, minimume, ejon por renkontiĝi, kaj ni devos nepre utiligi la ejon de la E-grupo de la urbo. Nia agado, do konsistas el helpado kiel eble plej bone aranĝi la reorganizacion de tiu grupo.

Ricardo Sanís: Delegito en VALENCIA.

---

- DEK KONSILOJ DE JEFFERSON POR LA PRAKTIKA VIVO -

1. Frokrastu neniam ĝis morgaŭ kion vi povas fari hodiaŭ
  2. Ne trudu al alia persono laboron, kiun vi mem povas plenumi.
  3. Ne elspezu monon pli frue, ol vi ĝin posedas.
  4. Aĉetu neniam tion, kion vi ne bezonas.
  5. Evitu la fieron, ĝi malutilos vin pli multe, ol la malsato, soifo kaj malvarmo.
  6. Neniam bedaŭru, ke vi tro malmulte manĝis.
  7. Kion vi faras, faru volonte.
  8. Ne maltrankviliĝu pri la malbonoj, kiuj okazos nenian.
  9. Rigardu la aferojn ĉiam de ilia bona flanko.
  10. Kiam vi koleras, kalkulu ĝis dek, antaŭ kiam vi parolos; se vi estas tre kolera, kalkulu ĝis cent.
-

- I N F O R M A C I Ó N -

En el importantísimo diario barcelonés "La Vanguardia" apareció un artículo titulado "Esperantismo" debido a la pluma del prestigioso músico catalán Juan Manen. El citado artículo señalaba la necesidad del idioma internacional. He aquí un elocuente párrafo del citado artículo: ¿No podrían pues decretar un día los gobernantes de todos los países que además de la lengua patria se aprendiera otra internacional? Pensad, amigos; sólo con que todos los funcionarios públicos y cuantos intervienen en el tránsito, horpedaje, etc.; se vieran obligados a hablarla desaparecerían los problemas idiomáticos y sería un deleite viajar hasta por los más remotos parajes del globo." Huelgan comentarios.

En Barcelona, tendrá lugar en mayo del próximo año 1961 el Congreso Internacional de Ferroviarios Esperantistas. Por las impresiones e informaciones recibidas hasta el momento, dicho congreso promete ser un éxito rotundo. Hemos sabido que entre otras cosas tendrán lugar: concurso de carteles; festival en el Pueblo Español, corrida de toros, etc. Ni que decir tiene que programa de conferencias, asambleas, etc., será sensacional. Y además, como nota final cabrá para quienes lo deseen, un desplazamiento a Palma de Mallorca donde se celebrará el Congreso Nacional de Esperanto, al cual se ha hecho coincidir con el término del de los ferroviarios para ofrecer así una culminación estupenda al mismo. Resumiendo, serán dos congresos que se complementarán el uno al otro y por cuya causa el de ferroviarios promete ser de los más brillantes que se hayan nunca celebrado.

En el mes de octubre corriente, empezarán los nuevos cursos de Esperanto, en los diversos grupos de Barcelona. Se publicaron anuncios en el "Diario de Barcelona" y se repartieron hojas de propaganda. Esperamos el éxito corone los esfuerzos en pro de la difusión del Esperanto.

Nos place comunicar que el día 4 de octubre tuvo lugar el enlace matrimonial entre los samideanos Bernardo Gracia y la Srta. Mercedes Riera. Desde estas páginas les enviamos nuestras sinceras felicitaciones y votos deseando se cumpla en ellos aquello de... "Y durante muchos años fueron muy, muy felices, y tuvieron muchos, muchísimos y hermosos hijos."

- - - - -

Es en vano que millares y millares de personas, amontonadas en un breve espacio de terreno, se esfuerzan en esterilizar la tierra que las sustenta; en vano tratan de aplastar el suelo bajo las piedras para que la germinación sea imposible; en vano arrancan hasta la postrera brizna de hierba; en vano impregnan el aire de petróleo y de humo; en vano cortan los árboles y echan cuadrúpedos y pájaros; hasta en la ciudad, la primavera es siempre primavera. Resplandece el sol, la hierba recidiva crece no sólo en los senderos y paseos sino entre las piedras de la calle; los adedules, álamos y cerezos silvestres esparcen la pompa de sus hojas olorosas y frescas, los tiernos brotes ostentan sus botones prestos a estallar; los gorriones, las palomas, las golondrinas, construyen alegremente sus nidos; las abejas y las moscas zumban en el aire extasiadas al sentir de nuevo el calor del sol; todo respira alegría; árboles, pájaros, insectos y niños. Sólo los hombres no cesan de engañarse y atormentarse a sí mismos y a los demás; no miran y admiran los hombres en esa mañana de primavera las divinas galas del universo, creado para la dicha de los vivientes a los que invita a la paz, a la unión, al amor; no estiman esos dones, no comprenden su carácter sagrado; únicamente estiman aquello que han imaginado para engañarse y atormentarse recíprocamente.

R E V I V I G O

Tradukis. S.Aragay

Estas vane ke miloj kaj miloj da personoj sur eta terspaco amasigitaj klopodas por steriligi la teron, kiu nutras ilin, vane intencas piedpreni la grundon sub la ŝtonoj por ke la ĝerminado estu neebla; vane elŝiras eĉ la lastan herbe ron vane impregnacias la aeron pere de petroleo kaj fumo; vane hakas la arbojn kaj for ĵetas kvarpedulojn kaj birdojn; eĉ en la urbo, la printempo estas ĝiam printempo. Brilas la suno, la herbo, revivita, kreskas ne nur inter la vojetoj kaj promenejoj, sed inter la ŝtonoj de la strato. La betuloj, tremoloj kaj merizarboj divastigas la pompon de siaj odoraj kaj freŝaj folioj, la molaj plantidoj elmontras siajn burgonestojn tuj pretaj eksplodi; la paseroj, la kolomboj, la hirundoj konstruas gaje siajn nestojn, la abeloj kaj la

musoj zumas ekstaze en la aero kiam ili sentas denove la sunvarnon; ĉio spiras ĝojon; arboj, birdoj, insektoj kaj infanoj. Nur la homoj ne ĉesas trompi kaj turmenti sin men kaj aliajn; ne rigardas kaj admiras la homoj dum tiu printempa mateno la diajn beligajojn de la universo kreitaj por la feliĉo de la vivantoj, al kiuj invitas al paco, al unueco, al amo; ili ne estimas tiujn donacojn; ili ne komprenas iliajn sanktan ecaron; nur estimas tion, kion ili estas imagintaj por trompiĝi kaj turmentiĝi reciproke.

- - - -

### MOKNOMOJ KREITAJ DE L'NACIIISMO

Mi volas malkovri satire kiel unu nacio kreditas al si mem la bonajn kvalitojn kaj ofte nekonscie, pro nescio aŭ antaŭjuĝo, atribuas la malbonajn kvalitojn al aliaj.

Ju pli oni laŭdas sin mem, des pli oni kritikas alian. Ni fermas la okulojn pri nia kulparo, sed pligrandigas alies erarojn.

En Germanio kiam bildo pendas malrekte sur muro, oni kutimas diri ke oni devas korekti la ENGLISH de la bildo. Jen tiu vorto en la germana lingvo signifas malrekteco, kurbecco, perfideco, k.t.p. En Usono, en la bulludejo, kiam la ludanto penas ĵeti serpente la bulon, li idiome diras, ke li PUTS ENGLISH ON THE BALL. La francoj en historio parolas pri "perfida Albiŝon". Sed kompreneble en Anglio mem la anglo estas honestulo, kies parolo estas lia kontrakto, k.t.p.

En Britio kiam homo forŝteliĝis de la hotelo nepaginte sian konton oni diras: HE TOOK FRENCH LEAVE (li prenis "francan" forpermeson). Same en Usono; sed en Francio la adjektivo estas ANGLA.

Kiam homo paroladas kaj aŭskultantoj ne komprenas, la usonano diras: "Gi estas GREKA al mi". La ruso almenaŭ antaŭjare: "Estas ĈINA". La germano: "Estas HISPANA". La polo: "Mi aŭskultas TURKAN predikon".

Hispano ricevanta malaltan salajron plendas, ke li "estas laboranta por la angloj". Franco nomas pedikon "hispano". La nederlando diras "tiel fanfaronema kiel franco". Rumano havas la esprimon "obstina kiel bulgaro". Ceko nomas hungaron "akno". La italoj iam nomas la necesejon "la anglo".

En kritiko de ebrulo la ĉeko diras: "Li trinkas kiel nederlandano". En Nederlando la esprimo uzata estas "Kiel



nolo". La japana vorto por alilandano signifas "odoraĉo  
"premda hararo".

Venera malsano reciproke ŝanĝis sian nomon laŭlande.  
"English pox" fariĝas la "French pox" per transiro de  
la mar-ŝanelo inter la du landoj.

Kreditoro en Francio estas "anglo". Fripono en kart-  
ludo estas en ambaŭ landoj nomata "greko".

En Usono naciece oni parolas pri "hispana influenco"  
(gripo), "germana morbilo", "azia gripo", "franca variolo  
"meksika aŭ japana skarabo" (lukano), kiu formangas la  
foliojn kaj detruas la arbojn, "nederlanda velkigo de ulmo"  
"mediteranea fruktmuŝo" (dangera pesto). Neniam la adjek-  
tivo estas usona.

Kompreneble tiaj frazoj solaj ne havas signifon. Sed  
ili evidentiĝas la mensan kaj intelektan klimaton, kiu  
influsa la naciecan homon

Eĉ en nia ordinara parolo estas isultoj kaj antaŭjuĝoj  
pri homo, kiu ne tiel bone kaj saĝe kiel ni elektis siajn  
gepatrojn kaj patriojn. Ni en nia vortaro kaj verkado peno  
eĉ en frazoj fariĝi homaranoj.

Kompilis parte el "SENNACIULO" Jozefo Bienvenido.

-----  
- N I R I D U -

PRIVATA SEKRETARIINO - "Do, f-ino Lemke, viaj atestoj kaj  
referencoj estas unuarangaj. Vi konsideru vin dungitakiel  
mia privata sekretariino. Sed nun mi bezonas ankoraŭ kiel  
eble plej malbelan foton de vi." - "Ĉu malbelan foton?" -  
"Jes, por montri ĝin al mia edzino!"

PRIVATA SEKRETARIINO (2). - "Aŭskultu, kara edzino, vi do-  
nacis al mi okaze de mia naskiĝofesto akvon kontraŭ  
kaŭperdo. Tio estas vere dankinda de vi, sed... miaj haroj  
malberdiĝas." - "Ne la viaj, sed tiuj de via privata se-  
kretariino: ĉiutage mi trovas kelkajn sur via vesto!"

ANEKDOTO PRI ZAMENHOF - Foje Zamenhof promenis en parko.  
Laciĝinte, li eksidis sur benko. Tie jam sidis alia sin-  
jero, evidente ne juda kaj, ŝajne, krome sub la influo  
de alkoholo, kiu rigardis lin arogante. Zamenhof ŝajnis  
ne vidi la arogantan rigardon. Tiam la alia lin alparolis  
per impertinente-moka tono: "Vi tie, mi rakontu ion al vi.  
Mi aŭdis, ke en siberia tundro ekzistas regiono, kien  
ankoraŭne venis eĉ unu judo nek unu porko". "Do," res-  
pondis Zamenhof trankvile, "ni ambaŭ vojaĝu tien!"